La 21-an de aŭgusto 1987 mortis prof. d-ro Istvan *Szerdahelyi*, universitata docento gvidanto de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato Eötvös Lorand ekde ĝia fondo en 1966. Li famigis la fakon ankaŭ en internaciaj pedagogiaj kaj fakaj rondoj per la tiea scienca laboro, per universitataj lernolibroj kaj diplomigis preskaŭ 100 gestudentojn.
La instrua kaj scienca laboro pluiris eĉ kun du plentempaj postenoj, kiujn plenumas du ekstudentinoj, liaj kunlaborintinoj: Ilona Koutny kaj d-ino Zsuzsa Varga-Haszonits.
La fako estas unika en tio, ke ĝi donas samvaloran diplomon kiel aliaj fakoj de la universitato kaj ofertas kompletan esperantologian studtemaron por kvar jaroj. La studoj inkluzivas krom la lingvoinstruado, priskriban gramatikon, literaturon, movadhistorion, metodologion, interlingvistikon kaj temojn de la ĝenerala kaj aplikata lingvistiko. Tiel ĝi estas integra parto de la katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, en kies kadro ĝi funkcias. Eblas ankaŭ doktoriĝi pri esperantologio.
Por pluaj informoj bv. turniĝi al Esperanto-fako, ELTE, Budapest, Pf. 107. H-1363 Hungario.

Offizielle Bekanntmachung

Oficialaj Sciigoj de AIS - Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Laŭjura sidejo en la Respubliko de San Marino

Prezidanta Sekretariejo: KleinenbergerWeg 16B, D-4790 Paderborn, Tel. (0049-/0-)5251-64200
Senata Sekretariejo: p.a. G.Sammaritani, Via Eulimella, RSM-47031 Galazzano/Serravalle, Tel.: 0039541-901009
Subtena Sektoro: p.a. ADoc.Dr.L.Weeser-Krell univ.prof., HerbramerWeg 9, D-4790 Paderborn
Kontoj: Poŝtĝirokonto 2051-305 Hannover (BLZ 250 100 30) - kun subkontoj ankaŭ por la Subtena Sektoro kaj por la unuopaj apartenantoj - & Banca Agricola Commerciale della Repubblica di San Marino, kontoj n-ro 712 (por la Scienca Sektoro) kaj n-ro 644 (por la Subtena Sektoro)
Finredaktita: 1988-03-19/1687pfR *Redakcia respondeco: OProf.Dr.Helmar FRANK*

Provizora, unuecigita ekzamenregularo

ĈAPITRO I: CELO

Artikolo 1: Ekzamencelo

1.1 AIS kontrolas per ekzamenproceduro, ĉu la akirita scienca kapablo kaj la plenumitaj fakaj laboroj de kandidato konformas al la kriterioj kiuj legitimigas laŭ internacia idealo la agnoskon de la konsiderata sciencista grado (titolo).

1.2 Per la ekzamenproceduro estas plue kontrolata, ĉu la kandidato estas ekkoninta en sia fako eblojn kaj malfacilojn de la internacia scienca kunlaboro kaj akirinta sufiĉan kapablon por la internacilingva ĉifaka komunikado.

1.3 La ekzamenado rilatas al kvar niveloj, al kiuj estas alordigitaj la sekvaj latinaj (kaj internacilingvaj) sciencistaj gradoj kaj titoloj:

1. Baccalaureatus ... (bakalaŭro ...) - mallonge: Bac. ...
2. Magister ... (magistro ...) - mallonge: Mag. ...
3. Doctor ... (doktoro ...) - mallonge: Dr. ...
4. Doctor ... habilitatus (doktoro habilita ...) - mallonge: Dr. ... habil.

AIS aplikas tiucele la formalajn kriteriojn, kiujn preskribas la Sanmarina Kadra Universitato-Leĝo por la akiro de la kvar konformaj itallingvaj sciencistaj gradoj kaj titoloj (Diploma, Laurea, Specializzazione, Dottorato di Ricerca). Per aldonaj formalaj kaj enhavaj postuloj AIS celas certigi per siaj internacie kunmetitaj ekzamenkomitatoj la formalan kaj enhavan egalvalorecon kompare al alilingvaj sciencistaj gradoj, titoloj kaj rangoindikoj (precipe de la germana, franca kaj aliaj eŭropaj lingvoregionoj), kaj per tio la agnoskindecon ankaŭ en la fremdlingva mondo. Per tio AIS intencas kontribui al la evoluigo de internaciaj komparkriterioj kaj al la iama starigo de komunaj postuloj kaj nomoj por titoloj.

1.4 Sur neniu el la kvar nivelŝtupoj AIS asertas la indecon de kandidato havi la koncernan sciencistan gradon (titolon), se ne eblis jese respondi kaj al la demando pri la faka nivelo (starigita en art. 1.1), kaj al la demando pri la taŭgeco por la internacia faka kunlaborado. Tiel la du postulitaj kvalitoj ne povas anstataŭi unu la alian. Nur se ambaŭ postuloj estas sufiĉe plenumitaj, eblas havigi ekzamenateston, kiu resumas la rezulton per frakciforma noto inter 0 kaj 1 tiel, ke 6/10 signifas la minimumon necesan por la sukceso en la ekzameno.

1.5 Aplikendas kiel kriterioj la samaj ekzamenpostuloj, sendepende de tio, ĉu la aspirata sciencista grado (titolo) estu - surbaze de la pozitiva ekzamenrezulto - agnoskota originale (originalekzameno: originalagnosko), aŭ ĉu ĝi sendepende de AIS estis jam donita kaj nun - kunkonsiderante kromajn, ĉe AIS plenumitajn laborojn - estu agnoskota en normigita internacia formo (reekzameno: adapta adopto).

Artikolo 2: Aliaj ekzamenoj

2.1 La studadmatureco (abiturientiĝo) estas laŭ art. 7.8 de la regularo pri la instruado kaj studado la kondiĉo por la akcepto kiel studento de AIS kaj sekve ankaŭ kondiĉo por la akcepto al la fina ekzameno. La studadmatureco estas la nivelŝtupo nulo, al kiu sekvas la kvar nivelŝtupoj 1 - 4 indikitaj en art. 1.3. Ĉi tiu unuecigita ekzamenregularo nur enhavas preskribojn por la ekzamenoj cele akiron de ĉi tiuj kvar striktasence sciencistaj gradoj.

2.2 Ligitaj al la agnosko de unu el la sciencistaj gradoj (titoloj) fare de AIS (ĉu per originalekzameno, ĉu per reekzameno) estas la aligo al la neformala Internacia Scienca Kolegio (ISK) de AIS (art. 1.3 de la alvokoregularo) kaj la uzadrajto de la sciencista grado (titolo) kadre de la Akademio, sed ne aŭtomate jam pluaj rajtoj. Tamen, la havigo de sciencista grado estas kondiĉero por diversaj rajtoj kaj roloj

Außerhalb der redaktionellen Verantwortung

kadre de AIS. La kondiĉoj por la akiro de rango- kaj funkci-titoloj kadre de AIS estas difinitaj per la statuto, la statutapendico kaj la alvokoregularo. El art. 5.3 de la alvokoregularo precipe sekvas, ke la agnosko de la sciencista grado (titolo) „Doctor ... habilitatus" ne inkluzivas la havigon de la instrurajto (venia legendi). La preceduro kondukanta al la instrurajto estas mallongigebla per la habilitdoktoriĝo kaj jam difinita per la regularo por la docentiĝo de 1983-10-21, kiun ne anstataŭas ĉi tiu ekzamenregularo.

2.3 Se pro elstaraj meritoj estas agnoskita unu el la titoloj honorkaŭze (kun la aldono „honoris causa"), tiam ne okazas la ekzameno. Detalojn preskribas ĉapitro IX.

Artikolo 3: Fakoj

3.1 Fakoj, kiuj esence povas pretendi validecon nur rilate difinitajn naciojn, religiojn kaj politikajn konvinkojn, ne rolas ĉe AIS kiel ekzamenfakoj de ajna el la kvar nivelŝtupoj. (Eblas malrekte elekti tiajn temarojn kiel stud- kaj instruobjektojn de idehistoriaj, religikomparaj, kulturgeografiaj aŭ aliaj sciencaj esplor- kaj instrukampoj principe sendependaj de la individua starpunkto.)

3.2 Elekteblas kiel ekzamenfako (kerna aŭ kroma) nur fako, kiun reprezentas ĉe AIS minimume unu (profesoro aŭ alia) docento. Por originalekzameno eblas elekti nur fakojn (ekz. „plantpatologio/plantprotektado") aŭ fakgrupojn (ekz. „komunikadsciencoj"), por kiuj jam ekzistas ĉe AIS oficialigita instruplano.

3.3 Por subteni interfakan laboron eblas elekti kiel kernfakon (t.e. fakon, en kiu radikas la temo de la scienca laboraĵo) fakgrupon kaj aldoni unu aŭ (kaze de studado cele magistriĝon) du kromfakojn ne najbarajn al la kernfako (aŭ inter si). Kiel alia ekstremo de la gamo de akceptota specialiĝo oni povas, anstataŭ tiaj vastaj studadoj, ankaŭ male - cele tre profundan specialiĝon kaze de studadoj celantaj magistriĝon aŭ doktoriĝon - elekti limigitan kernfakon kaj aldoni al ĝi specialkampon el ĝi kiel (kaze de magistriĝo duoblan) kromfakon, kiu tiukaze fariĝas pliprofundiĝfako. Nemalhavebla estas nur la plenumo de la studadamplekso preskribita per la regularo pri instruado kaj studado, kaj tio ne nur rilate la kvanton de atestitaj studunuoj sed ankaŭ rilate la amplekson de la konoj, kiun povas akiri per tioma tempoinvesto normale laborkapabla kaj labormotivita studento.

3.4 La sciencista grado (titolo) agnoskita estas fake precizigita per la indiko de la sekcio, kiu flegas la elektitan kernfakon (aŭ la elektitan kernon de la fakgrupo elektita kiel kernfako), nome al la sekcio

I (kibernetiko) per „scientiarum cyberneticarum" („pri kibernetiko") - mallonge: sc.cyb.
II (humanistiko) per „scientiarum humanarum" („pri humanistiko") - mallonge: sc.hum.
III (struktursciencoj) per „scientiarum structuralium" („pri struktursciencoj") mallonge: sc.struct.
IV (filozofio) per „scientiarum philosophicarum" („pri filozofio") - mallonge: sc.phil.
V (natursciencoj) per „scientiarum naturalium" („pri natursciencoj") - mallonge: sc.nat.
VI (morfosciencoj) per „scientiarum morphologicarum" („pri morfosciencoj") mallonge: sc.morph.

La kvinlingva dokumento kaj la same kvinlingva ekzamenatesto sciigas la kernfakon internacilingve.

Artikolo 4: Aliaj preskriboj

4.1 Ĉi tiu regularo anstataŭas kune kun la regularo pri instruado kaj studado de 1987-09-06 la skizojn de diplomiĝ- kaj doktoriĝregularoj de la 8a kaj 9a de oktobro 1983 kaj la pli malfruajn aldonajn preskribojn por la kazo de adapta adopto. La regularo esence fiksas la proceduron evoluitan ĝis la aŭgusto 1986 (SUS 3) kaj ekde tiam montriĝintan taŭga. La sciencistaj gradoj (titoloj), kies agnoskon fare de AIS estas dokumentitaj pli frue, restas kadre de AIS validaj, precipe ankaŭ kiel kondiĉoj por alvokoj aŭ akcepto al pli altnivelaj studoj kaj ekzamenoj.

4.2 Kiu jam sukcese trapasis ian finan ekzamenon ĉe AIS antaŭ ol esence ekvalidis la ĉi tie fiksitaj reguloj, rajtas senpage kontroligi formale, fare de la ekzamenoficejo de AIS, ĉu la kondiĉoj por la agnosko de la sciencista grado estas esence plenumitaj ankaŭ konsiderante la kriteriojn fiksitajn per la nuna regularo. Kaze de jesa kontrolrezulto senpage atestota, eblas postuli, pagante 1 AKU kiel administradkotizon, la havigon de nova dokumento interŝanĝe por la ĝisnuna, la konforman enregistrigon kaj la notarian certigon de ĉi tiu enregistrigo. Kaze de nea kontrolrezulto tio nur eblas ekde kiam la kompletigaj laboroj estas plenumitaj, kies adekvatan amplekson la ekzamenoficejo fiksas por la unuopa kazo.

4.3 Ĉi tiu ekzamenregularo ekvalidis laŭ art. 13.2 de la statutapendico kiel kompletigo de la regularo pri instruado kaj studado.

ĈAPITRO II: EKZAMENOFICEJO KAJ EKZAMENKOMITATOJ

Artikolo 5: Elekto de la ekzamenoficejo

5.1 La Senato elektas por la daŭro de sia deĵortempo plenrajtan membron de AIS kiel direktoron de la ekzamenoficejo. La membroj de la ekzamenoficejo elektas el inter si vicdirektoron por la tempo ĝis la venanta ekzameninterval0.

5.2 La Senato alvokas el ĉiuj 6 sekcioj por la daŭro de sia deĵortempo po du pluajn membrojn en la ekzamenoficejon; minimume po unu inter ili devas esti efektiva membro de AIS. La elekto de adjunktoj nur eblas unuanime (sen konsidero de eventualaj sindetenoj). La dekanoj rajtas submeti proponojn kaj devas laŭbezone mem akcepti la alvokon en la ekzamenoficejon.

5.3 La kunsidojn de la ekzamenoficejo gvidas la direktoro, aŭ, se tio ne eblas, la vicdirektoro. En la neĉeesto de ambaŭ la sekretario aŭ vicsekretario de la Senato (eĉ sen aparteneco al la ekzamenoficejo) gvidas. Kaze de neĉeesto de ĉiuj menciitaj respondeculoj la ĉeestantoj elektas el inter si kunvengvidanton.

Artikolo 6: Ekzamenkomitatoj

6.1 Por ĉiu kandidato dise la ekzamenoficejo starigas ekzamenkomitaton, kiu realigas la finan ekzamenon. La komitato konsistas por la nivelŝtupoj 1 kaj 4 (baccalaureatus kaj doctor habilitatus) el 6, por la du interŝtupoj el 11 membroj, inter kiuj devas ĉiukaze esti almenaŭ unu membro de la ekzamenoficejo kaj almenaŭ unu reprezentanto de la kernfako.

6.2 Ĉiu ekzamenkomitato devas esti internacie kaj estu laŭeble interfake kunmetita. Ĝi reprezentu almenaŭ tri naciojn (lingvoregionojn). Krom la reprezentantoj de la sekcio, kiu flegas la kernfakon (la elektitan kernon de fakgrupo) apartenu al la komitato po minimume unu reprezentanto de almenaŭ du aliaj sekcioj de AIS. La kromfako (kaze de nivelŝtupoj 2 aŭ 3) aŭ la kromfakoj (kaze de nivelŝtupo 2) estu reprezentitaj en la ekzamenkomitato.

6.3 Nur rajtas aparteni al ekzamenkomitato
(1) efektivaj membroj de AIS
(2) adjunktoj de AIS, kiuj almenaŭ nacinivele havas la koncernan (aŭ pli altan) sciencistan gradon
(3) invititaj prijuĝintoj de la scienca laboraĵo, eĉ se ili ne apartenas al AIS kaj/aŭ ne mem havas la koncernan sciencistan gradon
(4) eventualaj oficialuloj de la instanco rajtigita je havigo de originala titolo.

6.4 Se la kandidato proponas por la ekzamenkomitato profesorojn de la sekcio fleganta la kernfakon, kaj se ili pretas partopreni en la ekzameno, tiam la propono estas akceptenda tiomgrade, kiom eblas sen malhelpo plenumi la aliajn preskribojn pri la konsisto de la ekzamenkomitato.

6.5 La ekzamenkomitato elektas membron kiel gvidanton kaj alian membron kiel protokolanton. Ambaŭ apartenu al la respondeca sekcio kaj estu efektivaj membroj.

ĈAPITRO III: EKZAMENPARTOJ

Artikolo 7: Formala antaŭekzameno

7.1 La direktoro de la ekzamenoficejo aŭ alia membro de la ekzamenoficejo ŝarĝita de li kontrolas la kandidatdosieron rilate formalan kompletecon, postulas laŭbezone ankoraŭ mankantajn erojn kaj serĉas inter la apartenantoj de AIS kompetentan reprezentanton de la fako, al kiu li tuj transdonas cele antaŭekzamenon la internacilingvan resumon de la scienca laboraĵo kaj laŭdezire ĉi tiun laboraĵon mem. Se rezultas, ke la formalaj kondiĉoj por la akcepto al la ekzameno ne estas plenumitaj, tiam la ekzamenoficejo tuj informas la kandidaton. Se rezultas, ke verŝajne la kandidato malsukcesos aŭ preskaŭ ne sukcesos, tio estas sciigenda al li dum tri monatoj post ricevo de la kandidatiĝo, ofertante al li la nuligon de la kandidatiĝo. En ambaŭ kazoj la kandidato rericevas la duonon de la ekzamenkotizo pagita de li por la ne okazonta ekzameno.

Artikolo 8: Enhavaj ekzamenpartoj

8.1 Surbaze de la dosiero estas ekzaminenda, ĉu la postulenda malplialtnivela studadkompletigo estas atingita. Tiu ĉi postulenda antaŭŝtupo estas por la bakalaŭrecekzameno (nivelŝtupo 1) la studadmatureco laŭ art. 7.8 de la regularo pri instruado kaj studado (nivelŝtupo 0), por la magistrecekzameno (ŝtupo 2) la sukcese trapasita bakalaŭrecekzameno de AIS (ŝtupo 1), por la doktorecekzameno (ŝtupo 3) la sukcese trapasita magistrecekzameno de AIS (ŝtupo 2) kaj por la habilitdoktorecekzameno (ŝtupo 4) la sukcese trapasita doktorecekzameno de AIS (ŝtupo 3). Anstataŭ tia studadkompletigo eblas ĉiukaze agnoski pli altan, sciencistan gradon - ne (originale aŭ per adapta adopto) fare de AIS agnoskitan - kiel plenumon de la akceptokondiĉo, do ekz. aliloke akiritan magistrectitolon kiel plenumon de la kondiĉo esti akceptata por la magistrecekzameno ĉe AIS.

8.2 Surbaze de la submetitaj atestoj estas ekzamenenda, ĉu la minimume necesaj studadlaboroj laŭ art. 7-8 de la instru- kaj studadregularo estas plenumitaj sen estinti necesaj jam por l la necesa antaŭa studadkompletigo. Ĉi tiaj jam konsumitaj studadunuoj nur tiam estas denove agnoskeblaj por studadkompletigo ĉe AIS, se

(1) ili aperas nun kiel eroj de la kromfakstudado aŭ

(2) anstataŭ la kompletigo ĉe AIS de la postulenda malpli alta studado la kandidato prezentas la samrangan kompletigon faritan ĉe alia kleriginstitucio cele adaptan adopton.

8.3 Studunuoj por kromfako de la magistrecekzameno povas jam esti akiritaj antaŭ la bakalaŭrecekzameno. Fako, kies sukcesplenan kompletigon certigas la atesto de la magistrecekzameno estas agnoskebla sen nova ekzameno kiel kromfako de doktorecekzameno. Kiel kromfakoj de magistrec- aŭ doktorecekzamenoj estas agnoskeblaj ankaŭ aliloke kompletigitaj studfakoj; kiel jam kompletigita duobla kromfako (de dua magistrecstudado) povas roli tamen nur la kernfako de jam sukcese trapasita magistrec- aŭ doktorecekzameno.

8.4 Studadkompletigo realigita ĉe alia kleriginstitucio sur iu nivelŝtupo (1 - 4) povas esti adapte adoptita, se surbaze de la dosiero supozindas, ke

(1) antaŭiris kompletigo sur la senpere malplialta ŝtupo,
kaj ke

(2) entute (inkluzive eventualajn kromfakojn) aldonaj (por la malplialta studadkompletigo ne necesaj) studunuoj estas akiritaj en amplekso ne esence malpli granda ol postulita por originala ekzameno ĉe AIS.

(Laŭbezone la ekzamenoficejo fiksas - aldone al la postuloj de art. 8.4 de la studadregularo - la ankoraŭ plenumendajn studojn necesajn por la adapto. Precipe necesas prezenti sciencan laboraĵon, se tio ne jam necesis por la aliloka akiro de sciencista grado.)

Se ne eblas pruvi per ekzamenatesto aŭ alia dokumento, ke studado sur la senpere pli malalta nivelo estas sukcese kompletigita (ekz. en la kazo de doktoriĝo sen ekzameno almenaŭ egalnivela al la magistrecekzameno, aŭ kaze de kompletigo sur nivelŝtupo 2 sen ekzameno almenaŭ egalnivela al la bakalaŭrecekzameno), tiam adapta adopto nur eblas, se surbaze de la studadcertigiloj kaj la aliaj fakaj laboroj de la kandidato ne ekzistas dubo pri tio, ke nek la scienca nivelo atestita per la aliloke akirita sciencista grado, nek la tuto de la studad- kaj alia faklaboro de la kandidato malsuperas la postulojn starigitajn fare de ĉi tiu ekzamenregularo por la koncernata nivelŝtupo. Tia decido de la ekzamenoficejo devas - kune kun la motivoj - eniri la ekzamendosieron.

8.5 Estas kontrolenda, ĉu la skriba ekzameno en la kernfako kaj la fakekzamenoj en ĉiu eventuala kromfako estas sukcese trapasita ĉe AIS, aŭ ĉu anstataŭe estas agnoskebla laŭ art. 8.3 de la instru- kaj studadregularo aŭ laŭ art. 8.3-8.4 de ĉi tiu ekzamenregularo aliloka kompletigita studado. Nekaze la realigo de la ankoraŭ manka ekzameno estas organizenda kune kun la koncernata sekcio.

8.6 Cele prijuĝon de la scienca laboraĵo estas necese peti - laŭeble de apartenantoj de AIS - pri ekspertizoj: unu sufiĉas kaze de bakalaŭriĝaŭ magistriĝlaboraĵoj, almenaŭ du necesas kaze de disertacio por iu doktorecŝtupo. Kaze de reekzamenoj anstataŭe eblas agnoski la ekspertizojn de la gvidantoj kaj originalaj prijuĝintoj, se ili estas disponeblaj kaj agnoskitaj de fakulo alvokita en la ekzamenkomitaton fare de la ekzamenoficejo.

8.7 Necesas proponi al la ekzamenoficejo taŭgan ekzamenkomitaton cele alvokon. Deziroj de la kandidato estu laŭeble respektataj.

ĈAPITRO IV: KANDIDATIĜO

Artikolo 9: Kandidatiĝo por kursfinekzameneto

9.1 Art. 3.6 kaj art. 7 de la regularo pri instruado kaj studado fiksas la proceduron de la kandidatiĝo por kursfinekzameneto. La kursgvidanto fiksas la ekzamenmanieron. Per la noto 6/10 sur la atestilo li certigas, ke la partopreninto atingis pli altajn konojn, ol esperis la kursgvidanto jam kiel antaŭscio de la partopreninto. (La kriterioj por la kursfinekzamenetoj estas do multe malpli severaj ol tiuj de la fakaj partaj ekzamenoj kaj la fina ekzameno.) Almenaŭ pri unu triono de la necesaj, atestitaj studunuoj (kaj per tio pri almenaŭ du trionoj de la postulitaj kern- kaj specialiĝkursoj) estas bezonata tiusence sufiĉa noto. Eventualajn notojn de kromaj atestoj la kandidato rajtas enkrampigi.

9.2 Atestoj (kun aŭ sen notoj) pri partopreno en kursoj, kiujn AIS ne realigis kaj kiujn neniu apartenanto de AIS anoncis cele enirigon en la kursarregistron, ne validas.

9.3 Kandidatiĝo pri objektigita kurso okazas ĉe la ekzamenoficejo aŭ senpere ĉe ekzamenonto skribe petata de la ekzamenoficejo organizi la ekzamenon.

Artikolo 10: Temopropono por scienca laboraĵo

10.1 La kandidato povas interkonsenti pri temo de scienca laboraĵo por nivelŝtupo 1-3 kun

patronanto, kiu estas efektiva membro de AIS, antaŭvidas surbaze de la ĝisnuna faka laboro de la kandidato sukcesplenan pritrakton de la temo, pretas poste verki ekspertizon pri la laboraĵo, kaj - kaze de disertacio - pretas serĉi kompetentan duan ekspertiziston. Ankaŭ eblas, ke la kandidato serĉas por sia jam preta laboraĵo inter la efektivaj membroj de AIS ekspertiziston.

10.2 Por disertacio (nivelŝtupo 3 aŭ 4) kandidato povas anonci temon kaj klarigi ĝin per samtitola projektakceptiga prelego kadre de SUS cele interesigon de almenaŭ du ekspertizistoj.

10.3 Pri temo kaj enhavplano de disertacio por habilitdoktoriĝo, pri la proksimuma tempointervalo ĝis la pretigo, kaj pri du ekspertizistoj interkonsento necesas kun la dekano de la koncernata sekcio aŭ kun la fakarestro de la koncernata fakaro.

10.4 La scienca laboraĵo estas havigenda en du (nivelŝtupoj 1 aŭ 2) aŭ tri (nivelŝtupoj 3 aŭ 4) ekzempleroj nur post la permeso de la patrono aŭ kun la apogo de ekspertizisto. Almenaŭ unu ekzemplero devas esti bone kopiebla. Samtempe la kandidato povas anonci sin al la fina ekzameno. Se li tion ne faras, tiam li devas pagi ekspertizkotizon je 1 AKU (nivelŝtupo 1), 2 AKU (nivelŝtupo 2), 3 AKU (nivelŝtupo 3), 4 AKU (nivelŝtupo 4). Subtenaj membroj kaj adjunktoj aŭ efektivaj membroj de AIS ĝuas rabaton je po 25%. La kotizo ne estos repagata se la kandidato retiras sian laboraĵon. - Sufiĉas havigi nur unu ekzempleron de scienca laboraĵo, kiu jam aliloke estas akceptita kiel parto de sukcesa kandidatiĝo sur la egala nivelŝtupo (kaze de adapta adopto).

Artikolo 11: Kandidatiĝo por skriba aŭ buŝa ekzamenparto

11.1 Antaŭ la buŝa bakalaŭrecnivela finekzameno necesas trapasi skriban ekzamenparton, antaŭ la buŝa magistrecnivela finekzameno po unu skriban ekamenparton en la kernfako kaj en ĉiu kromfako. Antaŭ la buŝa doktorecnivela finekzameno necesas trapasi skriban aŭ buŝan (laŭ decido de la reprezentantoj de la koncernata sekcio en la ekzamenoficejo) ekzamenparton en la kromfako. - Tiu ĉi postulo estu konsiderata kiel jam plenumita en la kazo de adapta adopto. Art.8.3 de la regularo pri instruado kaj studado difinas la pluajn esceptojn kaj kondiĉojn.

11.2 La ekzamenpartoj okazas normale en la loka kaj tempa kadro de SUS.

11.3 La kandidatiĝo por ekzamenpartoj okazas plej malfrue 5 monatojn antaŭ la tempointervalo antaŭvidita por ekzamenoj. La finekzameno povas jam okazi en la sama tempointervalo. Se ĝi pli malfrue okazas, tiam estas pagenda por ĉiu ekzamenparto kotizo je 2 AKU. Subtenaj membroj kaj adjunktoj aŭ efektivaj membroj ĝuas rabaton je po 25%. La ekzamenkotizo ne estos repagata, se la kandidato forrestos de la ekzamenparto.

11.4 Kandidatiĝante oni indiku la specialaĵo(j)n en kiu(j)n oni pruveble pliprofundiĝis dum minimume 8 studunuoj kaj oni proponu 2-3 kompetentajn fakekzamenistojn, kiuj pretas partopreni la ekzamenon, apartenas al la scienca sektoro de AIS kaj ne estu ĉiuj samnaciuloj. Almenaŭ unu el ili devas esti efektiva membro. Se la ekzamenoficejo elektas alian ekzameniston, la kandidato devas esti senprokraste informita pri tio; kaze de anstataŭo de proponita efektiva membro necesas sciigi la kialon al la kandidato.

Artikolo 12: Kandidatiĝo por la finekzameno

12.1 La kandidatiĝo por la finekzameno okazu plej malfrue 5 monatojn antaŭ la malfermo de la SUS en kies kadro la ekzameno realiĝu. Samtempe la ekzamenkotizo pagendas. Ĉi tiu ampleksas kaze de normala reekzameno (cele adaptan adopton) 1,6 AKU por la nivelŝtupo 1, 3,2 AKU por la nivelŝtupo 2, 4 AKU por la nivelŝtupo 3 kaj 6 AKU por la nivelŝtupo 4. Por la finekzameno kaze de originala titoligo same kiel kaze de adapta adopto de sciencista grado akirita sen scienca laboraĵo ankoraŭ disponebla, la duobla kotizo pagendas. La kotizo inkluzivas la eventualajn ekzamenpartojn okazantajn dum la sama tempointervalo kaj la prijuĝon de la scienca laboraĵo. Subtenaj membroj kaj adjunktoj aŭ efektivaj membroj de AIS ĝuas rabaton je po 25%. De la kotizo estos repagata la duono, se la kandidato retiriĝas plej malfrue 2 monatojn antaŭ la tempointervalo de la ekzamenoj, alikaze neniom. Laŭ konvinke motivita peto eblas, ke la ekzamenoficejo decidas parton de la kotizo krediti favore al eventuala kandidatiĝo por unu el la du sekvantaj ekzamen-tempointervaloj.

12.2 Kaze de tro malfrua kandidatiĝo estas pagenda malfruiĝkotizo laŭ la kotizregularo, se la ekzamenoficejo ankoraŭ akceptas la kandiatiĝon; tion oni ne rajtas pretendi.

12.3 La kandidatiĝo estu anoncata al la ekzamenoficejo (kun kopio sendenda al la prezidanta sekretariejo) per komplete plenigita kandidatletera formularo. Kaze ke la plenigo estas nekompleta aŭ evidente malvera same kiel kaze de forstreko de iu el la postulitaj asertoj, la ekzamenoficejo rajtas postuli novan plenigon.

12.4 Aldonendas al la kandidatletero
1) la dokumento pri la necesa antaŭa studado kompletigita sur la senpere malpli alta aŭ la sama ŝtupo (eventuale kun traduko en oficialan lingvon de AIS)
2) la scienca laboraĵo kune kun (a) po unu informriĉa, denslinia, kopiebla resumo (po 1-5%n de la amplekso) en ILo kaj en alia oficiala lingvo de AIS, (b) la sciigo de nomo kaj adreso de la patrono kaj eventuale de la dua ekspertizisto, kaj (c) laŭeble kopio de ekspertizo (anstataŭe eblas aldoni rajtigilon peti ĝin de aliloke),
3) memverkitan vivpriskribon en oficiala lingvo de AIS, reliefigante precipe la sciencan karieron kaj laŭplaĉe (kaze de nivelŝtupo 4 devige) aldonante liston de la propraj sciencaj publikaĵoj,
4) pruvilon de la legkapablo en ILo kaj de la kontentiga komunikadkapablo en almenaŭ unu el la kvin oficialaj lingvoj de AIS, kiu ne estas gepatra lingvo de la kandidato (ĉi tion pruvi eblas ankoraŭ senpere antaŭ la finekzameno)
5) pruvilon de sufiĉaj studadlaboroj kaj ekzamenrezultoj laŭ art. 3.4 kaj 8.5 de la regularo pri instruado kaj studado same kiel (se tio ne okazu senpere antaŭ la finekzameno) laŭ la tieaj artikoloj 8.3, 8.4 kaj 8.6 (kaze de reekzameno cele adaptan adopton kiel pruviloj rolu land- aŭ universitat-tipaj dokumentoj)
6) eventuale atestoj pri jam sukcese trapasitaj ekzamenpartoj (se ili ne okazu dum la sama ekzamentempointervalo, aŭ se ne nur reekzameno por adapta adopto estas celita)
7) sciigo, ĉu kaj jeskaze kiam, kie kaj pro kiu jura fakto okazis kondamno pro plenumita krimo,
8) deklaro, ke la ekzamenregularo estas konata,
9) deklaro, ĉu la sama aŭ enhave simila disertacio jam estas rifuzita de alia instituicio aŭ ĉu doktoriĝklopodo, al kiu tiu disertacio servis, fiaskis.

Motivige petite la ekzamenoficejo povas permesi la postsendadon de parto de la aldonaĵoj dum deca tempo. Petante tion oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn aŭ adiciu 0,1 AKU al la pagenda ekzamenkotizo.

Artikolo 13: Avertoj

13.1 Kiu ne kompletigis la antaŭkondiĉitan studadon almenaŭ per la resuma rezultnoto 7/10 (cum laude), provu akiri pli altan sciencistan gradon prefere tute ne aŭ ne antaŭ ol akiri kroman studadkompletigon egalnivelan al la jam atingita.

13.2 Necesas informi la kandidaton okaze de la akcepto al la finekzameno, se la kandidatiĝo nur eblas por alia ol la sekcio antaŭvidita de li, aŭ se pro formalaj kialoj li nur povas certi, ke post sukceso en la ekzameno li nur povas ricevi la ateston prie sed ne (tuj) la dokumento pri la agnosko de la koncernata sciencista grado (titolo).

ĈAPITRO V: EKZAMENPARTOJ

Artikolo 14: Ĝeneralaĵoj

14.1 La ekzamenoficejo fiksas lokon, tempon kaj daŭron de la ekzameno. La daŭro de skriba ekzamenparto estu inter 3 kaj 4 horoj, la daŭro de buŝa ekzameno inter 1 kaj 2 horoj (ĉikaze inkluzive paŭzon).

14.2 La kandidato pruvas antaŭ la komenco de la ekzameno sian identecon per sia pasporto aŭ identigilo. La numero estas protokolenda.

14.3 La ekzameno okazas en ILo, se ne alia lingvo estas temo de la ekzameno tiel ke la uzado de ĉi tiu lingvo ankaŭ por la ekzameno estas legitima. En motivitaj kazoj AIS povas escepte permesi laŭpete alian oficialan lingvon de AIS por la ekzamenparto same kiel laŭ art. 21.3 por la finekzameno.

14.4 La malfacileco de la ekzameno devas esti en la ekzamenparto pri la kernfako same kiel en la finekzameno konforma al la nivelŝtupo de la aspirata sciencista grado (titolo). Se la kondiĉo de adekvata malfacileco estas plenumita, la kandidato, kiu kompletigis la antaŭkondiĉitan studadon en ĉi tiu fako almenaŭ per la kompetenteco 7/10 (cum laude), rajtu esperi, ke li akiros dum la laŭregula studadtempo la konojn kaj kapablojn sufiĉajn por sukcese trapasi la ekzamenon. La laŭregula studadtempo inkluzivas - krom la (en art. 3.4 de la regularo pri instruado kaj studado fiksita) kursartempo - ankaŭ la proksimume saman tempon por la pliprofundiga, memstara pripensado de la enhavoj. (La kriterioj do estu multe pli severaj ol kaze de kursfinekzameneto.) - Ekzamenparto en (ne duobla) kromfako ne diferencu rilate enhavon kaj malfacilecon disde la skriba ekzamenparto sur la nivelŝtupo 1 (t.e. de la skriba bakalaŭriĝekzameno), ekzamenparto en duobla kromfako ne diferencu disde la ekzamenparto pri la kernfako de la nivelŝtupo 2 (t.e. de la skriba magistriĝekzameno).

Artikolo 15: Skribaj ekzamenpartoj

15.1 Ĉiu de la nomumitaj 2-3 ekzamenistoj proponas al la ekzamenoficejo du taskojn el la studadkampoj menciitaj de la kandidato, kune kun la aserto, ke la kandidato ne estas informita pri la proponitaj taskoj. La ekzamenoficejo elektas la duonon de la proponitaj taskoj; ne ĉiuj elektitaj taskoj estu proponitaj de la sama ekzamenisto.

15.2 La kandidato mem elektas unu el la taskoj, kiujn li ricevis, kaj pritraktas ĝin observite dum la fiksita ekzamentempo uzante nur la rimedojn, kiujn oni bontempe menciis aŭ havigis al li kiel permesitaj rimedoj.

15.3 La taskoaŭtoro prijuĝas la pritrakton per noto inter 0 kaj 1 en dekonoj. Kaze de la prijuĝo per 10/10 la ekzamenoficejo rajtas peti kroman prijuĝon fare de fake kompetenta dua ekzpertizisto kaj uzi la aritmon de ambaŭ notoj. Kaze de prijuĝo malpli bona ol 6/10 la kandidato rajtas postuli la prijuĝon ankaŭ fare de dua ekspertizisto kaj proponi tian al la ekzamenoficejo; ĉi tiu povas sen sciigi kialojn apogi sin anstataŭe sur alian duan ekspertiziston; se la aritmo de la rezultaj notoj ne estas minimume 12/20, tiam la kandidato malsukcesis en la ekzameno.

Artikolo 16: Buŝaj ekzamenpartoj

16.1 Buŝa ekzamenparto okazas nepublike, se ne la kandidato mem deziras publikecon. Membroj de la ekzamenoficejo, senatanoj kaj vicsenatanoj de AIS same kiel eventualaj reprezentantoj de la instanco rajtigita doni originale la titolon, rajtas ĉeesti ĉiun ekzamenparton.

16.2 Pri la buŝa ekzamenparto estas verkenda konciza protokolo. Ĝi enhavas la notojn, kiujn donis la unuopaj ekzamenistoj, kaj la aritman noton en entjeraj dudekonoj aŭ tridekonoj.

16.3 Ĉiuj ekzamenistoj de buŝa ekzamenparto devas persone ĉeesti; en la kazo de malhelpo aŭ estas bezonata anstataŭanto, aŭ la ekzamenparto okazu disigite sed en la ĉeesto de observanto, kiu verkas la protokolon de ambaŭ partoj.

ĈAPITRO VI: SCIENCA LABORAĴO

Artikolo 17: Variaĵoj

17.1 Normale la scienca laboraĵo konsistas el maŝinskribita, fare de la kandidato dulingve verkita teksto kun antaŭmetita skeletigo, postmetita literaturlisto kaj aldonita aserto, ke la laboraĵo estas memverkita sen uzi aliajn fontojn kaj helpojn ol la menciitajn, kaj ke la eroj transprenitaj laŭvorte aŭ enhave el la uzitaj verkoj estas tiusence indikitaj. Personoj helpintaj estas (per dankesprimo) laŭnome kun indiko de la helpmaniero menciendaj; tio ankaŭ koncernas la helpon rilate la lingvan, grafikaĵan kaj tipografian formigon. La unua tekstvortigo estu en ILo; la kandidato mem elektas la lingvon de la dua vortigo, kiu estu en paralela kolumno apudmetita; elektendas tiel, ke fakkompetenta membro de la ekzamenkomitato estas trovebla, kiu povas legi la laboraĵon en la dua lingvo. Ne gravas, kio estas la originala vortigo kaj kio la traduko. Aldonendas al la laboraĵo du densliniaj resumoj (po 1-5%) en oficialaj lingvoj de AIS, el kiuj kaze de nivelŝtupo 2-4 devas esti eksciebla, en kio la kandidato vidas sian memstaran sciencan laboron.

17.2 Empiriaj laboraĵoj povas grandparte konsisti el tabeloj, bildoj kaj aŭdvidaj aldonaĵoj. Konstrukciaj laboraĵoj povas esti kompletigitaj per programoj, aparatoj, formigoj ktp. Tamen la pensa kernlaboro devas esti trovebla en la tekstparto de la scienca laboraĵo.

17.3 La scienca laboraĵo povas esti jam antaŭe publicita. Tiukaze ĝi povas ankaŭ konsisti el kunigitaj unuopaj publikaĵoj, kiuj havas internan interrilaton kaj kune plenumas la postulojn starigendajn pri scienca laboraĵo por la koncerna nivelŝtupo; normale resumo klarigu la interrilaton inter la disaj rezultoj. Krome validas la preskriboj de art. 17.1.

17.4 Scienca laboraĵo por la nivelŝtupo 2-4 povas ankaŭ konsisti el la solvo de kompleksa problemo per esplorgrupo. Tamen ĉiu partoprenanto devas ĉikaze
1) esti tiom kontribuinta, kiom necesas por propra scienca laboraĵo sufiĉa por la koncernata nivelŝtupo,
2) prezenti propran tekston, kiu ne plejgrandparte estas laŭvorte identa kun la teksto de alia membro de la grupo,
kaj
3) reliefigi en sia teksto kaj en ties resumo la propran kontribuon kaj ties gravecon por la komuna laboro.
En la finekzameno ĉiu partopreninto devas esti kapabla klarigi la tutan projekton rilate celon, aliĝmanieron, metodon kaj rezulton. - Krome validas la preskriboj de art.17.1.

17.5 Kaze de adapta adopto la originala laboraĵo estas akceptebla rezignante pri la lingvaj preskriboj de art. 17.1, se la laboraĵo estas jam akceptita en ajna oficiala lingvo de AIS por jam okazinta sciencista titoligo, aŭ se ĝi estas prezentita al AIS en la originala lingvo kune kun traduko en ILon. Ambaŭkaze necesas aldoni po unu denslinia, informriĉa resumo (1-5%) en ILo kaj dua oficiala lingvo de AIS. Se la originala laboraĵo aĝas pli ol 10 jarojn, estu aldonenda almenaŭ unu pli nova publikaĵo de la kandidato el la laborkampo de la sama sekcio, eventuale kune kun resumo en ILo, se ĉi tiu publikaĵo ne estas en oficiala lingvo de AIS.

Artikolo 18: Postuloj

18.1 Per la scienca laboraĵo por la nivelŝtupo 1 la kandidato pruvas per la ekzemplo de sia temo, ke li kapablas propravorte prezenti konatan, de la fakularo nuntempe fidatan ekkonon de sia fako en maniero ĝusta, lingve akceptebla, kaj komprenebla de leganto atinginta la studadmaturecon, kaj ke li, tiel verkante, povas sekvi la preskribitajn formaljn regulojn pri la pretigo de scienca publikaĵo. Se la laboraĵo sen redakcia pritrakto indas esti publikigita en popularscienca revuo, ĝi ricevu minimume la noton 8/10 (magna cum laude).

18.2 Per la scienca laboraĵo por la nivelŝtupo 2 (magistriĝtezo) la kandidato pruvas per la ekzemplo de sia temo, kies pritrakto plenumas esence pli altajn postulojn ol temo de la nivelŝtupo 1, ke li kapablas ĉerpi memstare el diversaj publikaĵoj de la fakliteraturo la jam ekzistajn metodojn kaj sciencajn ekkonojn, per kiuj starigita scienca problemo estas solvebla, kaj ke li kapablas, per memstara kombino de ĉi tiuj metodoj kaj ekkonoj trovi la solvon aŭ alproksimiĝi al ĝi. La temo povas esti problemo, por kiu jam ekzistas solvoj por aliaj kazoj, sed ankaŭ la malkovro de interrilatoj inter disaj ekkonoj aŭ la kombino de ĉi tiuj al nova ekkono, aŭ la laŭmetoda trova de novaj empiriaj rezulteroj utilaj kadre de teorio.

18.3 Per scienca laboraĵo por nivelŝtupo 3 (doktoriĝdisertacio) la kandidato pruvas per la ekzemplo de sia temo, kies pritrakto plenumas esence pli altajn postulojn ol temo de la nivelŝtupo 2, ke li kapablas per propra esploro, kvankam kun konsilado flanke de sperta esploristo, en scienca specialkampo pliriĉigi la hodiaŭan scion aŭ malfermi novajn sciencajn ekkonojn per starigo de interfakaj kunligoj.

18.4 Per sia scienca laboraĵo por nivelŝtupo 4 (habilitdoktoriĝ-disertacio) la kandidato pruvas sian kapablon memstare realigi sciencajn esplorojn en ne malvasta sciencokampo, sian superrigardon super ĉi tiu kampo, kaj sian kapablon ĝin limigi disde aliaj kampoj, klarigi ĝian rolon en la socikultura kadro, kaj starigi en tiu sciencokampo novajn sciencajn problemojn. La propra kontribuo al la esploro povas konsisti ĉu en la solvo de malfacila specialproblemo, ĉu en kontribuo al nova strukturigo de sciencobranĉo per kreiva kombino de pluraj disaj problemoj, metodoj kaj ekkonoj.

18.5 Rilate la (netan) tempobezonon supozendan (nur) por la enhava kaj vortiga realigo de scienca laboraĵo de kandidato, kiu jam kompletigis la fakstudadon sur la antaŭkondiĉenda nivelŝtupo per mezuma ekzamenrezulto (ĉ. 8/10), la art. 3.4 de la regularo pri instruado kaj studado supozigas

1) 2-4 netajn laborsemajnojn kaze de nivelŝtupo 1,
2) 8-15 netajn laborsemajnojn kaze de nivelŝtupo 2,
3) 18-34 netajn laborsemajnojn kaze de nivelŝtupo 3,
4) 60-110 netajn laborsemajnojn kaze de nivelŝtupo 4.

La reala daŭro (en kalendarsemajnoj) plilongiĝas almenaŭ pro la samtempa studadlaboro en kursoj, eĉ se la studento laboras koncentrite. La temo de la scienca laboraĵo por la senpere pli alta ŝtupo povas esti plivastigo aŭ pliprofundigo de la jam prilaborita temo; tio reduktas la supozendan tempobezonon konforme al la amplekso de ĉi tiu preparlaboro.

18.6 La vortigo de la scienca laboraĵo evitu senutilan redundancon, tiel ke la esenca teksto (sen antaŭparolo, skeletigo, literaturlisto kaj eventualaj apendicaj tabeloj, programoj ktp.) havu kaze de la nomotetaj sekcioj (I, III, V) en ambaŭ lingvoj amplekson inter la jenaj limoj:

1) por la nivelŝtupo 1: 10-30 kolumnoj
2) por la nivelŝtupo 2: 40-120 kolumnoj
3) por la nivelŝtupo 3: 60-180 kolumnoj
4) por la nivelŝtupo 4: 100-300 kolumnoj.

Kaze de sciencaj laboraĵoj por ideografa sekcio (II, IV, VI) la duobloj de ĉi tiuj limoj servu por orientiĝi. Kaze de la vortigo en ILo la litergrandeco kaj la interspaco estu elektitaj tiel, ke neta kolumno (sen formuloj, bildoj kaj tabeloj) enhavu ĉ. 1.600 skribmaŝinajn signojn.

Artikolo 19: Publikigo

19.1 Unu kopiebla ekzemplero de la laboraĵo (rekomendita formato: A5 aŭ A4) restas en la arĥivo de AIS. La kromajn ekzemplerojn rajtas alpropriigi al si la ekspertizisitoj. Apartenantoj de AIS kaj aliaj sciencistoj rajtas studi ajnan enarĥivigitan laboraĵon kaj fari eventuale kopion por si.

19.2 Al kandidatoj, de kiuj tezo por la nivelŝtupo 1 aŭ 2 estas akceptita kun noto almenaŭ 8/10, oni rekomendu elpreni la esencon por publikaĵo en popularscienca (kaze de nivelŝtupo 1) aŭ scienca (kazo de nivelŝtupo 2) revuo, kaj tie mencii la fakton, ke la baza laboraĵo estas akceptita flanke de AIS.

19.3 Disertacioj akceptitaj flanke de AIS por originala special- aŭ habilitdoktorigo estu publikigota dum 2 jaroj, plenuminte eventualajn ŝanĝpostulojn de la ekspertizistoj kun la aprobo flanke de la koncernata finekzamena

komitato. La aŭtoro disponigu al AIS 7 ekzemplerojn. Se publikigo ne okazas, tiam estas havigendaj de la eventuale ŝanĝita teksto 7 binditaj kopioj. AIS rajtas antaŭ la transdono de la agnosko-dokumento postuli kiel garantiaĵon 5 AKU, kiujn ĝi kvitancas kaj redonos komplete post bontempa havigo de la devigaj disertaciekzempleroj.

ĈAPITRO VII: FINEKZAMENO

Artikolo 20: Anonco

20.1 La fina ekzameno okazas kadre de SUS kiel kandidatprelego kun sekvanta diskuto. Laŭ art. 9.7 de la regularo pri instruado kaj studado la SUS-aliĝintoj estas invitendaj. La invito okazu per afiŝo je la diskonigita loko plej malfrue la antaŭan tagon, sciigante la nomon de la kandidato.

20.2 La temo de la kandidatprelego povas sed ne devas koincidi kun la temo de la scienca laboraĵo aŭ aldonita posta publikaĵo.

20.3 Ankaŭ interesitoj, kiuj ne aliĝis al SUS, povas observi la finan ekzamenon.

Artikolo 21: Daŭro kaj ekzamenlingvo

21.1 La kandidato prelegas en ILo. Li rajtas uzi manuskripton, preparitajn diafanfoliojn, diapozitivojn, bildojn ktp. Ne estas permesite prelegi en alia lingvo.

21.2 Ne estas akceptebla prelego malplilongdaŭra ol 10 minutojn por la nivelŝtupo 1, 15 por la nivelŝtupo 2 aŭ 3, 20 minutojn por la nivelŝtupo 4.

21.3 Normale ankaŭ la sekvonta diskuto okazas en ILo. La kandidato povas plej malfrue du tagojn antaŭ la ekzameno postuli,

1) la rajton respondi en alia oficiala lingvo de AIS,

aŭ krom tio (sed nur kaze de nivelŝtupo 1-3)

2) la rajton esti pridemandata en ĉi tiu alia lingvo aŭ ricevi tradukon en ĝin, se demando estis en ILo.

Starigante tian postulon estas pagenda la komunikadeduka kotizo laŭ la kotizregularo.

21.4 La tuta ekzamendaŭro (por prelego kaj diskuto) estu normale 30 minutoj por la nivelŝtupo 1, 45 minutoj por la nivelŝtupo 2, kaj 60 minutoj por la nivelŝtupoj 3 kaj 4. Oni antaŭvidu pluajn 15 minutojn, se la kandidato postulis nacilingvan tradukon de demandoj starigitaj en ILo.

21.5 La kandidato planu sian prelegon tiel, ke por la diskuto restu normale almenaŭ 10 minutoj, kaze de eventuale necesa traduko en nacilingvon almenaŭ 25 minutoj.

Artikolo 22: Ekzamendosiero

22.1 La kandidatletero kun dorsflanka protokolformularo, la scienca laboraĵo kun kopioj de la resumo en ILo kaj dua oficiala lingvo, same kiel certigita kopio de la atesto aŭ dokumento pri la antaŭkondiĉita studadkompletigo (t.e.kaze de reekzameno la pruvilo pri la jam aliloke ricevita sciencista grado, kaze de originala ekzameno la dokumento pri la studadkompletigo sur la senpere malpli alta nivelŝtupo, ĉu originale plenumita ĉe AIS, ĉu adapte adoptita, - aŭ eventuale la atesto pri studadmatureco) devas esti je dispono al la ekzamenkomitato dum la ekzameno; observantoj rajtas dume ilin rigardi. Ankaŭ la eroj 3, 4 kaj 5 postulitaj de art. 12.4 estu je dispono de la ekzamenestro kaj de la protokolanto; la aliaj ĉeestantaj apartenantoj al la personaro difinita en art. 16.1 rajtas trarigardi ĉi tiujn erojn.

22.2 Kandidato, kiu postulis nacilingvan diskuton de sia prelego, devas prezenti certigon de sia legkapablo en ILo flanke de organizo, kies tiurilatajn certigojn AIS aŭtomate agnoskas pro interkonsento. Anstataŭe eblas prezenti ateston pri sukcesa kursfinekzameneto de ILo-kurso por sciencistoj kiun la kandidato partoprenis dum SUS.

22.3 Pri la komunikadkapablo en oficiala etna lingvo de AIS, kiu ne estas gepatra lingvo de la kandidato, ĉiu apartenanto de AIS, pri kies gepatra lingvo temas kaj kiu en ĝi fake konversaciis kun la kandidato, povas subskribi neformalan ateston. En la atesto pri la fina ekzameno ne estu menciitaj eventualaj konoj de aliaj lingvoj ol la gepatra lingvo de la kandidato, ILo, la lingvo uzita por la scienca laboraĵo kaj la lingvoj pri kies konoj la kandidato havigis atestojn kiel menciite.

22.4 Necesas prezenti la pasporton aŭ identigilon de la kandidato; la numero estas mencienda en la protokolo.

Artikolo 23: Ekzamenprocezo

23.1 De la ekzamenkomitato la estro, la protokolanto kaj almenaŭ unu plua membro devas persone ĉeesti la finan ekzamenon. Ne ĉeestaj komitatanoj certigas per sia anticipa subskribo de la ekzamenprotokolo aŭ de aldonaĵo, ke ili trarigardis almenaŭ parte la ekzamendosieron kaj donas ĉibaze sian prijuĝon (inter 0 kaj 10 poentojn). Sindeteno eblas, ankaŭ de persone ĉeestaj komitatanoj; ĝi signifas aprobon de la aritmo de la donitaj prijuĝoj.

23.2 Post la kandidatprelego okazas la diskuto kun la membroj de la ekzamenkomitato. Se fine restas tempo, la gvidanto rajtas akcepti ankaŭ demandojn el la observantaro.

23.3 Post la diskuto la ekzamenkomitato interkonsiliĝas pri la rezulto. De la observantaro rajtas ĉeesti nur la personoj difinitaj en art. 16.1. Ĉiu membro de la ekzamenkomitato esprimas sian prijuĝon per poentoj inter 0 kaj 10. Krom la enhavo de la kandidatprelego kaj la diskuto oni konsideru ankaŭ la sciencan laboraĵon, la aliajn studadlaborojn kaj ekzamenrezultojn kaj la lingvan esprimkapablon. Se la kandidato estas postulinta antaŭe diskuton tute aŭ parte en etna lingvo oni ne rajtas jam pro tiu nesufiĉa esprimkapablo en ILo agnoski al li malpli ol 6 poentojn. Inverse en tia kazo oni eĉ pro tre bonaj fakkonoj normale ne donu 10 poentojn. Se ĉeestanto postulas kaŝitan prijuĝon, tiam ĉiuj donu kaŝite siajn poentojn. Al la sumo oni adiciu la poentojn de la malĉeestaj komitatanoj kaj transformu kaze de finekzamenoj sur la nivelŝtupoj 1 kaj 4 al entjeraj sesdekonoj, kaze de finekzamenoj sur la du interaj nivelŝtupoj al entjeraj centdekonoj; ne entjeran rezulton oni rondigu malsupren.

23.4 La ekzameno ne estas sukcese trapasita se la noto ne estas minimume 36/60 = 66/110. Kaze de sukcese trapasita ekzameno la latina notovortigo estas „rite“, se la rezulto malsuperas 42/60 = 77/110, „cum laude“ por pli alta sed 48/60 = 88/110 malsuperanta rezulto, „magna cum laude“ por pli alta sed 54/60 = 99/110 malsuperanta rezulto, kaj alikaze „summa cum laude“. Se kaze de adapta adopto la ekzameno ne estas sukcese trapasita, tiam oni ripetu la prijuĝon supozante ke la kandidato aspiris la senpere malpli altan sciencistan gradon; eventuale oni agnosku ĉi tiun.

23.5 Se pro la rezultinta noto la ekzameno estas ja sukcese trapasita, sed almenaŭ unu komitatano konstatas mankon, kiu malhelpas la tujan havigon de la atesto kaj tial devas fariĝi objekto de decido de la ekzamenoficejo, aŭ se la ekzameno ne estas sukcese trapasita por la fakte celita grado, tiam post la interkonsiliĝo estas neŭtralforme sciigenda, ke la komitato ankoraŭ ne povas konstati rezulton sed unue devas reparoli kun la kandidato. Alikaze oni gratulu la kandidaton en la ĉeesto de la observintoj. Oni povas diskonigi la noton.

Artikolo 24: Atesto

24.1 La kvinlingva atesto pri la fina ekzameno enhavas la mencion de la agnoskita sciencista grado (titolo) de la antaŭkondiĉita studadkompletigo kaj de la laboroj sur kiuj baziĝas la fina noto, mencion pri la oficialaj lingvoj de AIS pri kiuj la kandidato pruvis konojn, la finan rezulton en formoj de ordinara frakcio kaj de latina vortigo, kaj ankaŭ la nomojn, la AIS-oficialajn titolojn kaj la ŝtatanecojn de la komitatestro, protokolanto kaj de la aliaj membroj de la ekzamenkomitato. La ateston subskribas la direktoro de la ekzamenoficejo kaj la dekano de la respondeca sekcio. Eblas ke anstataŭe subskribas speciale ŝarĝita anstataŭanto.

24.2 Se membro de la ekzamenkomitato estas konstatinta mankon, tiam la ekzamenoficejo povas postuli de la kandidato forigi la mankon antaŭ la subskribo de la atesto aŭ pretigo de la dokumento. En kazo de dubo ekestu decido per plejmulto; la kandidato havas protestrajton ĉe la Senato.

24.3 La pretigo de la atesto finas la ekzamenproceduron kaj per ĝi la studadkompletigon por la koncernata nivelŝtupo. La ekzamendosiero estas konservenda almenaŭ 10 jarojn.

ĈAPITRO VIII: ATESTARLIBRO

Artikolo 25: Pretigo, enhavo, celo

25.1 Kiu enskribiĝas por kursoj de AIS rajtas postuli, prezentinte dokumenton pri sia studadmatureco kaj ricevinte ties aprobon, la pretigon de atestarlibro. Por la pretigo pagendas 0,3 AKU kiel kotizon. (Samalta kotizo estas pagenda por laŭpete dezirata duoblaĵo.)

25.2 La atestarlibro servas kiel kolektilo de la unuopaj atestoj de AIS pri studunuoj plenumitaj por certa nivelŝtupo. Krome la ekzamenoficejo registras la agnoskitajn alilokajn studadlaborojn resume en la atestarlibron. La kotizo por ĉi tiu resuma registrado de la plenumitaj kaj por la mencienda nivelŝtupo agnoskitaj studadlaboroj ampleksas 0,5 AKU. (La transpreno de la registritaj eroj kun originalaj stampo kaj subskribo en la samtempe prezentitan duoblaĵon okazas senpage.)

25.3 La agnoskeblon de prezentitaj unuopaj atestoj pri partopreno en kursoj el la kursarregistro de AIS certigas stampe kaj registras la ekzamenoficejo. La registradkotizo ampleksas por atestoj de AIS-apartenantoj po 0,1 AKU, por aliaj atestoj apogitaj de sufiĉa nombro da AIS-apartenantoj po 0,2 AKU. Senkotize okazas la registrado de atestoj pri partopreno en SUS-kursoj, en aliaj kursoj organizitaj de AIS mem, kaj en objektivitaj kursoj de AIS kompletigitaj per kursfina ekzameneto. Detalojn preskribas la art.7 de la regularo pri instruado kaj studado kaj la kotizregularo.

ĈAPITRO IX: HONORKAŬZAJ TITOLOJ

Artikolo 26: Gradoj kaj kondiĉoj

26.1 Se la antaŭkondiĉoj estas plenumitaj ĉiu el la kvar sciencistaj gradoj (titoloj) por ĉiu el la ses sekcioj estas agnoskeblaj honorkaŭze. Decidas la Senato en interkonsento kun la koncernata sekcio.

26.2 Efektiva membro de AIS ne povas esti honorigata. La honorigoto devas plenumi justagrade kvar kondiĉojn:

1) Li devas esti inda je honorigo, kaj tio
   1.1 kaj pro siaj moralaj kvalitoj
   1.2 kaj pro siaj elstaraj fakaj (kvankam ne nepre sciencaj) meritoj.
2) Li devas meriti ke speciale AIS lin honorigos, ĉar li persiste kaj eksterordinare subtenadis la celojn de AIS
   2.1 kaj per aga kunrealigado
   2.2 kaj per ripeta materia subteno.

26.3 La meritoj de la honorigoto estas menciitaj en la honordokumento kaj detaligitaj en la laŭdado voĉlegata dum la solena malfermo aŭ fermo de SUS.

26.4 Se nenio kontraŭa estas decidita kaj se la honorigoto ne jam havas pli altan rangon en la scienca sektoro de AIS, tiam li estas lige al la honorigo alvokota kiel Adjunkto Scienca (AScI).

ĈAPITRO X: AGNOSKO, RIFUZO, MALAGNOSKO, DISKONIGO

Artikolo 27: Agnosko

27.1 Post la sukcesa trapaso de la finekzameno eblas pretigi aldone al la ekzamenatesto la kvinlingvan dokumenton pri la agnosko de la aspirita sciencista grado (titolo), kondiĉe ke ĉi tiu grado (sub la sama aŭ alia nomo) jam antaŭ la fina ekzameno estis akirita ĉe aliloka, je titoldono rajtigita institucio (kazo de la adapta adopto), aŭ ke pro la ekzameno ekefikis alia legitimigo por la agnosko.

27.2 Kaze de honorkaŭza agnosko de titolo anstataŭ la ekzamenatesto estas pretigata pligrandigita duoblaĵo de la dokumento.

27.3 La transdono de la dokumento kaj eventuale de la atesto okazu kadre de malferma aŭ ferma ceremonio de SUS.

27.4 La dokumenton subskribas la prezidanto aŭ la vicprezidanto de AIS.

Artikolo 28: Rifuzo

28.1 Krom en la kazo de honorkaŭza agnosko la pretigo kaj transdono de dokumento pri la agnosko de sciencista grado (titolo) de AIS estas rifuzenda dum kiam

1) la finekzameno ankoraŭ ne estas sukcese trapasita, aŭ
2) ankoraŭ ne estas forigita alia manko, kiun konstatis membro de la ekzamenkomitato kaj kies forigon la ekzamenoficejo deklaris esti kondiĉo por la pretigo de la atesto aŭ de la agnoska dokumento, aŭ
3) alia legitimigo en la senco de art.27.1 ankoraŭ mankas.

28.2 Sukcesinta kandidato nur rajtas ricevi la ekzamenateston, sed ne dokumenton pri okazinta agnosko, se li estas leĝoforte kondamnita pro krimo punebla kiel krimo ankaŭ en la Respubliko de San Marino kaj ankoraŭ ne preskriptiĝinta. Pri tio decidas la kompetenta ŝtata instanco.

Artikolo 29: Malagnosko

29.1 Se post la transdono de la dokumento fariĝas konate, ke la plenumo de esencaj kondiĉoj por la sukcese trapasita ekzameno aŭ por la agnosko estis trompe pretendita de la kandidato, tiam la senato pro propono de la ekzamenoficejo povas nuligi la agnoskon, se ĝi datumas de antaŭ malpli ol 10 jaroj.

29.2 Malagnosko okazas, se en unuopa kazo pro kulpa sinteno de la titolricevinto leĝo de la Respubliko de San Marino tion postulas.

Artikolo 30: Diskonigo

30.1 Post pretigo de la dokumento la ekzamenoficejo en interkonsento kun la prezidanto zorgas pri la registrado en la registron de la portantoj de sciencistaj gradoj kaj titoloj, kiuj estas (en la de AIS agnoskita latina formo) uzeblaj en la Respubliko de San Marino. Ne eblas ricevi kopion de la registro, sed ja notarian certigon de la okazinta registrado. Kadre de AIS nur tiuj sciencistaj gradoj (titoloj) estas meteblaj kiel aldono antaŭ la nomon kaj post la rangotitolon, kiuj estas agnoskitaj de AIS (originale aŭ pro adapta adopto). La pli alta grado en la sama fako absorbas la malplialtan. Dua studadkompletigo sur la sama nivelŝtupo en la sama sekcio ne havigas kroman sciencistan gradon (titolon), sed ja kondukas al faka plivastigo de la ĝisnuna. En la mallongigo la sekciindiko („sc. ...“) estas forigebla. Se la portanto de la titolo oficiale loĝas en lando, en kiu speciala permeso estas

bezonata antaŭ ol oni rajtas publike uzi eksterlande akiritan sciencistan gradon aŭ titolon, aŭ se li dependas pro sia ŝtataneco de tia permeso, tiam li mem povas ĝin postuli. Flanke de AIS ne okazas aŭtomate sciigo al eksterlandaj instancoj.

30.2 Laŭbezone la prezidanto aŭ en interkonsento kun li la vicprezidanto zorgas pri ŝanĝo de la mencio en la registro (ekz. pri ŝanĝo de nomo aŭ pri eventuala malagnosko).

30.3 La agnosko (kaj eventuala malagnosko) estas publikigenda en la oficialaj sciigoj de AIS, menciante la nomon, oficialan loĝlokon, naskiĝtagon kaj -lokon, la fakon kaj la dokumentonumeron.

(Dekreto de 1987-10-16/1687pfR)

Novaj apartenantoj de AIS

En la „Oficialaj Sciigoj de AIS" aperintaj en grkg/Humankybernetik vol 27, n-ro 2, 1986 troviĝas la unua listo de la „Apartenantaro de AIS" kun stato 1986-06-20/1685pfR. Nur unufoje, en la „Oficialaj Sciigoj" aperintaj en la numero 4, 1987, de tiu revuo, okazis aktualigo per listo da 12 novaj apartenantoj de la scienca sektoro kaj de 7 novaj subtenaj membroj; tiam ankaŭ 5 adresŝanĝoj estis sciigitaj. Momente al AIS apartenas 39 plenrajtaj membroj (MdAIS), 46 asociitaj membroj (AMdAIS - 42 asociitaj profesoroj kaj 4 plenrajtaj docentoj), do entute 85 efektivaj membroj, kaj 151 adjunktaj apartenantoj (AdAIS - 37 asociitaj docentoj kaj 114 adjunktoj sciencaj); la tuta apartenantaro do ampleksas momente je 236 sciencistoj el ĉiuj loĝataj kontinentoj. Krome jam apartenas al ISK aliaj 173 sciencistoj eventuale alvokotaj, tiel ke la tuta Internacia Scienca Kolegio de AIS momente ampleksas 409 sciencistojn. La Subtena Sektoro momente havas 81 membrojn.

La distribuo al la kaj en la ses sekcioj estas la jena;

Sekcio	OProf	AProf	PDoc	ADoc	ASci	entute
Kibern.	9	9	1	8	29	56
Human.	12	7	1	11	52	83
Strukt.	4	6	1	2	6	19
Filoz.	0	4	0	3	4	11
Natursc.	12	13	0	12	11	48
Morf.	2	3	1	1	12	19
Sumo:	39	42	4	37	114	236

La sekvanta listo de la novaj apartenantoj de la Scienca Sektoro de AIS estas la dua kompletigo. Estonte ĉiu ISKano povos ricevi la plej aktualan staton de la apartenantaro kun adresoj kaj kromaj informeroj (Internacia Sciencista Dokumentaro de AIS) sur komputildiskedo.

Novaj Membroj de AIS (MdAIS)

OProf. Stefanos K. ANAGNOSTAKIS, dr., Ermou 69, GR-54623 Thessaloniki
OProf. Paul ARISTE, dr., Jakobsoni 7a, SU-202400 Tartu
OProf. Frederik BELINFANTE, dr., P.O. Box 901, Gresham, Oregon 97030 USA
OProf. CHOU, Io, dr., P.O. Box 55, N.W. College of Agriculture, CHN-Wugong Shaanxi, Ĉinio
OProf. Jonas DAGYS, dr., Lenino aikste 9-16, SU-232001 Vilnius, Litova SSR
OProf. Sin'itiro KAWAMURA, dr., Miyawakityô 2-4-19, J-760 Takamatu
OProf. Milos LANSKY, dr., Dörener Weg 2, D-4790 Paderborn
OProf. Georg MEIER, dr., Hauptstr. 37, D-8037 Olching
OProf. Elio MIGLIORINI, dr., Via Vitelleschi 26, I-00193 Roma
OProf. Tomoo NAKAYAMA, dr., Inogashira 3-5-12, Mitaka-shi, J-181 Tokyo
OProf. Oton PANCER, dr. , Dom „Lavoslav Svarc", Bukovačka cesta 55, YU-41000 Zagreb
OProf. Kiril Petkov POPOV, dr., Str. Dospat 23, BG-1463 Sofia
OProf. Reinhard SELTEN, dr., Hardtweg 23, D-5330 Königswinter 41
OProf. Bruce SHERWOOD, dr., Dept. of Physics, Carnegie-Mellon University, USA-Pittsburgh PA 15213
OProf. Humphrey TONKIN, dr., Office of the President, State University College USA-Potsdam NY 13676, Usono

Novaj Asociitaj Membroj de AIS (AMdAIS)

AProf. Jozef BRODY, Associate prof., 5795 Sir Walter Scott Apt. 804, CND-Montreal Quebec

AProf. Juan Carlos CARENA, dr., Rioja 3003, RA-Rosario/Argentinien
AProf. Naum CELAKOSKI, dr., Dragisa Misovic 8/28, YU-91000 Skopje
AProf. Sylla Magalhaes CHAVES, prof., Rua Barao de Itambi, 7 ap. 802-Botafogo, BR-22231-Rio de Janeiro
AProf. Cornelis DE JAGER, dr., Zonnenburg 1, NL-3512 NL Utrecht
AProf. Wim DE SMET, dr., Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout
AProf. Alberto FLORES, prof., Rua 19-B, N-ro 259, Federacia Universitato Brazilo, BR-27180 Volta Redonda, Brazilo
AProf. Yukio FUKUDA, dr., Nishi-Waseda 1-2-3 Shinjuku-ku, J-160 Tokyo/Japan
AProf. Mario GREGO, dr., Casella Postale 116, I-30100 Venezia
AProf. Konstantin KOLIOPOULOS, dr., Melissou 1, Pagrati, GR-11635 Athena
AProf. Hans-Michael MAITZEN, dr., Endemanngasse 6-18/1/24, A-1238 Wien
AProf. Rokuro MAKABE, dr., Zentrum der Augenheilkunde, Abtlg. für Funktionsdiagnostik, Theordor-Stern-Kai, D-6000 Frankfurt 70
AProf. Hristo MARINOV, dr., ul. Ami Boue 51, BG-1606 Sofia
AProf. Bela MESZAROS, dr., Vöröshadsereg u. 45/47 II.3, H-4025 Debrecen
AProf. Carlo MINNAJA, dr., Via Friuli 37 I-35030 Selvazzana D. (PD)
AProf. Hermann ÖLBERG, dr., Erzherzog-Eugenstr. 5, A-6020 Innsbruck
AProf. OUYANG Wendao, prof., No. 1, Xiao-Fangjia, Nan-Xiaojie, Chaoyangmen, CHN-Beijing, Ĉinio
AProf. Jonathan POOL, dr., 225 12th Avenue East, USA-Seattle, WA 98102, Usono
AProf. Ian McKenzie RICHMOND, dr., 66 Naomee Cres London, CND-Ontario N6H 3T5
AProf. Claude ROUX, dr., 16. Bd des Pins les Borels, F-13015 Marseille
AProf. Rüdiger SACHS, dr., Grenzknick 7, D-2000 Hamburg 70
AProf. Taĉio SAITO, prof., 403 Hiroo Garden Hills, 4-1-15 Hiroo Shibuya-ku, J-150 Tokio, Japanio
AProf. Osvaldo SANGIORGI, dr., Rua Mal. Hastimphilo de Moura 338, Portal do Morumbi-Ed, Manaca 7D, BR-05640 Sao Paulo/Brazilo
PDoc. Richard SCHULZ, Marienstr. 38, D-4950 Minden
AProf. Werner STROMBACH, dr., Hessenbank 16, D-4600 Dortmund 50
PDoc. Tyburcjusz TYBLEWSKI, dr., ul. Bartka Zwyciezcy 11/1, PL-58-500 Jelinia Gora
AProf. Robert VALLEE, prof.dr., 2, rue de Vouille, F-75015 Paris

Novaj adjunktaj apartenantoj de AIS (AdAIS)

(En ĉi tiu listo ankoraŭ mankas la sciencistaj gradoj - Bac., Mag., Dr. - agnoskitaj fare de AIS. Vd. la oficialajn sciigojn en grkg/Humankybernetik 27/3, 1986, pj. 138-140 kaj28/3, 1987, pj. 143-144.)

ASci. Philippe Henri ANDRES, dr., 254 allee Pablo Neruda M.P.2, F-60110 Meru
ASci. BAK Giuan, 210-401, New Seoul Apt. Hyosong-dong, Puk-ku, ROK-Inchon-160-70, Korea
ASci. Sergio BALDI, dr., Via Mosca 41, I-80129 Napoli
ASci. József BANGHA, dr., Bartok Bela str. 50 II 1A, H-1111 Budapest
ASci. Vera BARANDOVSKA, Volgogradska 41, CSSR-70400 Ostrava 3
ASci. Christian BERTIN, dr., 60, Allée de la Renaudière, F-35510 Cesson-Sérigné *
ASci. Gerrit BERVELING, Coornhertstr. 50, NL-3132 GK Klaardingen
ASci. Klaus BOECKMANN, prof.dr., A-9074 Keutschach
ADoc. Werner BORMANN, dr., Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80
ASci. Marjorie BOULTON, dr., 36 Stockmore Street, GB-Oxford OX4 1JT
ADoc. Keith BOWLING, dr., 42 Catalba Crescent, AUS-2074 Turramurra NSW, Australien
ASci. Norbert BRECHT, mag., Eckenerstr. 29b, D-5205 St. Augustin 2
ADoc. Tazio CARLEVARO, dr., Specialista FMH in psichiatria e psicoterapia, Via Alberto di Sacco 6, CH-6500 Bellizona
ASci. Ranieri CLERICI, Via Conte Verde 66, I-00185 Roma *
ASci. Irene COMMEẞMANN, dr., Bankstr. 42, D-4000 Düsseldorf 30 *
ASci. Manuel COMPANYS, prof.dr., 4, rve Paul Langevin Apt. 174, F-94120 Fontenay sous Bois *

---

* *Ĉi tiu sciencisto ankoraŭ ne akceptis la alvokon*

ASci. Gerald COOL, CH-6084 Wasserwendi
ASci. Paul DE MEESTER, prof.dr., St.-Jansbergsteenweg 211, B-3030 Leuven
ASci. Francis DESSART, prof.dr., 6, rue Moncrabeau, B-5000 Namur
ASci. Heinrich J. DINGELDEIN, Bergring 6, D-3550 Marburg
ASci. Constantin DRAGAN DE LUGO, prof.dr., Via Larga 9, I-20122 Milano *
ADoc. Michel DUC GONINAZ, dr., Val St.-Georges, Chemin de l'Echelle, F-13100 Aix en Provence
ASci. Susan DWYER-SHICK, prof., 225 12th Avenue East, USA- Seattle, WA 98102*
ASci. Jane EDWARDS, 69 Pierrefont Av. USA-Potsdam NY 13676 *
ADoc. Ruben E. FELDMANN-GONZALEZ P.O. Box 916, USA-El Centro CA 92244-0916
ASci. FENG, Zhengyuan, Peter-Hille-Weg 11, Zi. 620, D-4790 Paderborn *
ASci. Bernd FISCHER, prof.dr., Fachklinik Klausenbach, D-7611 Nordrach-Klausenbach
ASci. Reinhard FÖßMEIER, dr., Dollmannstr. 19 D-8000 München 90
ASci. GE Yongliang, Renmin Nanlu, Jiangsu Taicang, CHN-Shanghai, V.R. China *
ASci. Serenella GIACCHINO, Via G. Giusti 8, I-20154 Milano *
ASci. David L. GOLD, dr., 1610 Eshkol Tower, University of Haifa, Mount Carmel, IL-Haifa 31999, Israel *
ASci. Albert J. GOODHEIR, dr., 16 Woodland Drive, GB-Coatsbridge/Scotland
ASci. Klaus-Dieter GRAF, prof.dr., Kurstr. 5, D-1000 Berlin 33
ASci. Martin HAASE, Kiebitzweg 9, D-4600 Dortmund 50 *
ASci. Walter HAMMEL, prof.dr., Rolandsgärten 1, D-4790 Paderborn
ASci. Hartwig HARM, dr., Riesengebirgstr. 9, D-8013 Haar
ADoc. Ralph HARRY, 8 Tennyson Crescent, Forrest, ACT, AUS-2603 Canberra
ASci. Rudi HAUGER, ETH-Hönggerberg FKP F 17, CH-8093 Zürich
ASci. Michael A. HEATHER, Rosslyn' the Avenue, GB-Durham DHI 4DX *
ASci. Martin K.O. HENGST, prof., Giesebrechtstr. 8, D-1000 Berlin 12
ASci. Walter HEUBL, prof., Bergstr. 7, D-8901 Aystetten
ASci. Karl HIRMANN, mag.art., Ehlergasse 14, A-8010 Graz
ASci. Jean HOFFMANN, prof.dr., 213 Avenue Louise, B-1050 Bruxelles *
ASci. Alfred HOPPE, dr., Aug.-Bier-Str. 20, D-5300 Bonn 1
ASci. Eugen JARMARK, dr., Westring 109, D-4796 Salzkotten
ASci. Gerhard KALCKHOFF, dr., Schuckertstr. 14/XI, D-8000 München 70
ASci. Johannes KASSELMANN, dr., Bussardweg 10, D-4790 Paderborn
ADoc. Günter KLEMM, dr., Sebastianweg 12, D-5960 Olpe
ASci. Georg KLINGENBERG, dr., Schröttergasse 5, A-8010 Graz *
ADoc. Jan KNAPPERT, prof.dr., 40 Fitzjohn Avenue, GB-Barnet Herts EN5 2HW
ADoc. Leszek KORDYLEWSKI, dr., Karasia 6, PL-30-060 Krakow
ASci. Manfred KRAUSE, prof.dr., Knesebeckstr. 9, D-1000 Berlin 45
ASci. Margrete LANDMARK, dr., Torodveien 109, N-3135 Torod *
ASci. Uwe LEHNERT, prof.dr., Königin-Luise-Str. 73A, D-1000 Berlin 33
ASci. Antonio LOPRIENO, dr., Valle Miglioretti 4, I-10025 Pino Torinese (TO) *
ASci. Young-tae MA, Dong A Apt. Ma-106, Daechi-dong, ROK-Seoul 135, Korea
ASci. H.-D. MAAS, dr., Zweibrücker Str. 71, D-6680 Neunkirchen
ASci. Joseph MAJOR, m.a., 146 Donald St. NZ-Wellington 5, Neuseeland *
ASci. Dubravka MALES, Petrinjska 69, YU-41000 Zagreb *
ASci. Carmel MALLIA, dr., 89 Sanctuary str., M-Zabbar, Malto
ASci. Nicolas G. MARMATAKIS, prof., 4 Ar. .Papa str., GR-11521 Athen *
ASci. Sigrid MATERNE, dr., Gelfertstr. 47, D-1000 Berlin 33
ASci. Stefan MAUL, Pferseer Str. 15, D-8900 Augsburg
ASci. Herbert MAYER, Postfach 28, A-1014 Wien
ASci. Brigitte MEDER-KINDLER, dr., Talleweg 55, D-4790 Paderborn
ASci. Adolf MELEZINEK, prof.dr., Akazienhofstr. 79, A-9020 KLagenfurt
ASci. Miriam MICHELOTTI, Albergo La Grotta, RSM-47031 San Marino Citta
ASci. Neus MOLY MARTI, c/Girana 117, 4rt, E-08009 Barcelona *

ASci. Hermann MÜLLER, prof.dr., Eulenweg 12, D-5300 Bonn *
ASci. Edmond NICOLAU, prof.dr., 128 Eminescu Ap. 2, R-72112 Bukarest
ASci. Krystina v. NIEWIADOMSKI-KAUFFMANN, prof., Kehrstr. 28, D-5401 Dieblich-Berg
ASci. Wessel Jan NIJVELD, dr., Jan van Eijckstraat 25 b, NL-1077 LG Amsterdam
ASci. Brita OLSSON, Vingardstrade 17 II v, DK-1070 Kopenhagen K *
ASci. Johann Andreas PACHTER, Zum Kreuzbühl 16, D-7480 Sigmaringen 6
ASci. Karl-Ernst PAECH, Ahornstr. 12, D-8032 Lochham b. München *
ASci. Galdino PENDIN, dr., Via Bosco Novoleda, I-36030 Villaverla (V I)
ASci. Germain PIRLOT, Kemmelbergstr. 5/B.3, B-8400 Oostende
ASci. Manfred PLOETZ, prof.dr., Don-Bosco-Str. 4, D-5620 Velbert
ADoc. Angelo PORTA-PUGLIA, dr., Via Caravaggio 21, I-00010 Torlupara di Mentana (RM)
ASci. Roland POSNER, prof.dr., Südwestkorso 19, D-1000 Berlin 33
ASci. Piera RAFFO FEDERICI, Via San Pierdicanne 109, I-16043 Chiavari (GE)
ASci. Wolfgang REITBERGER, prof.dr., Neudecker Weg 137, D-1000 Berlin 47
ASci. Harald RIEDEL, prof., Muthesiusstr. 4, D-1000 Berlin 41
ASci. Karol ROSENBAUM, Azovsky 4, CS-82108 Bratislava *
ASci. M.H. SAHEB-ZAMANI, 46 Azarshahr, Iran-shahr Shamali, IR-15-846 Teheran, Iran
ADoc. Hilmar Ilton SANTANA FERREIRA Caixa Postal 205, BR-45600 Itabuna BA, Brasilien
ASci. Frantisek ŠATURA, dr., Javorinska 33, CS-81103 Bratislava
ASci Magda ŠATUROVA, dr., Javorinska 33, CS-81103 Bratislava
ASci. Raya Benjamin SAWADOGO, dr., B.P. 1972, Quagadougou, Bukina Faso *
ASci. Christoph SCHEIDEGGER, Im Baumgarten 5, CH-4144 Arlesheim
ASci. Gerd-Harro SCHUHMANN, Richard-Wagner-Str. 16, D-5100 Aachen
ASci. Ilse SCHULZ-THEURIG, Marienstr. 38, D-4950 Minden
ASci. Jan SEPP, dr., Budkova 10, CS-81104 Bratislava *
ASci. SHAO Rong, Fakultato de Aplika Matematiko, Daljan-a Instituto de Teknologio (DIT), CHN-Daljan, V.R. China
ASci. SHI Yongning, Gongwai Shida, CHN-Shijia-zhuang, V.R. China
ASci. Jens SIGSGAARD, dr., Ronneboeveij 73, DK-2840 Holte
ASci. Antun SIMUNIC, Dz. Bijedica 7/I, YU-54000 Osijek
ASci. Povl SKARUP, dr., Tornballevej 73 Tilst., DK-8381 Mundelstrup *
ASci. Klaus A.O. SONTAG, dr., Am Sorgfeld 55A, D-2000 Hamburg 55 *
ADoc. Stojco D. STOJCEV, dr., u. „Vasil Dimitrov" bl. 244A, BG-1404 Sofia
ASci. Firdaus SUKUROV, dr. str. 50 let Tadjikistana 43-35/ SU-734061 u. Dusanbe*
ADoc. Antoni TABACKI, str. Nowotki 30 m 40, PL-40-146 Katovice
ASci. Dimitr. TERZIEV, ul. Milin Kamak 58, BG-1421 Sofia
ASci. Birthe TRAERUP, Ved Amagerport 18 3th, DK-2300 Kobenhavn S *
ASci. Hartmut K. Reinhard TRUNTE, dr., Dorotheenstr. 161, D-5300 Bonn 1 *
ADoc. Rafaela URUEÑA, prof.dr., Avda Ramon y Cajal 12-2 C, E-Valladolid 11
ASci. WAN, Jianruo, 451, Lane 3671, Zhong Shan Bei Road, CHN-Shanghai 200062, V.R. China
ASci. Volkmar WEISS, dr., Rietschelstr. 28, DDR-7033 Leipzig
ADoc. Bengt-Arne WICKSTRÖM, prof.dr., Ibsens gate 122a, N-5037 Solheimsvik
ADoc. YASHOVARDHAN, Ludwigstr. 48, D-4790 Paderborn
ADoc. Vlastislav ZAZVORKA, dr., Studentska 7, CS-16000 Praha 6 Dejvice
ADoc. Prof. Hans-Jürgen ZEBISCH, Ludwigstr. 2, D-6146 Alsbach
ASci. Barbara ZOCHOWSKA-DESPINEY, dr., 35, rue Maurice Tenine, F-94260 Fresnes *

ILo-Grammatik kurzgefaßt

Zum 100-jährigen Bestehen der Internacia Lingvo hat die Verlagsbuchhandlung Hermagoras Mohorjeva, A-9020 Klagenfurt/Celovec, Viktringer Ring 26, diese originelle Visitenkartenrückseite mit dem klassischen Kern der ILo-Grammatik entwickelt. Nicht nur verschiedene bekannte Angehörige der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) *haben inzwischen dort ihre individuellen Visitenkarten mit dieser Rückseite drucken lassen.*

Der sehr günstige Preis (unabhängig von der Textlänge auf der Vorderseite der Visitenkarte): 600,- öS (d.h. knapp DM 100,-) für 500 Stück. Bei größerem Druckauftrag weitere Ermäßigung auf Anfrage.

La Internacia Lingvo (= ILo) de D-ro Esperanto (= Zamenhof) * 1887: Grammatik in 16 Regeln

Eine Kontaktanschrift finden sie umseitig

(1) Nur ein bestimmter Artikel: ‚LA' Unbestimmter Artikel = Weglassen des bestimmten Artikels.	(2) Alle Substantive enden auf ‚O'. Plural: Anfügen von ‚J'. Akkusativ: Anfügen von ‚N'. Genitiv und Dativ werden mit den Präpositionen DE und AL gebildet.	(3) Alle Adjektive enden auf ‚A', sonst wie bei Regel 2. Komparativ PLI . . Superlativ PLEJ . .	(4) Zahlwörter (undekliniert): unu du tri kvar kvin ses sep ok naŭ dek 100 = cent 1000 = mil. Ordnungszahlen: Anfügen von ‚A' (wie Adjektiv).
(5) Personalpronomen: mi vi li ŝi ĝi ni vi ili (ich du er sie es wir ihr sie) Possessivpronomen: Anfügen von ‚A' (wie Adjektiv).	(6) Verben enden auf: ‚AS' im Präsens, ‚IS' im Perfekt, ‚OS' im Futurum (Aktiv); zugeh. Partizipien (A/P): -ANTA/ -ATA, -INTA/-ITA, -ONTA/-OTA. Passiv: Form v. ‚sein' + Passivpartizip.	‚I' Infinitivendung ‚US' Konditionalendung ‚U' Imperativendung. (7) Adverben enden auf ‚E'. Steigerung wie bei Regel 3.	(8) Nach Präpositionen steht grundsätzlich der Nominativ. Bei Ortspräpositionen besteht Differenzierungsmöglichkeit nach Ort und Richtung entsprechend Regel 13.
(9) Jedes Wort wird so gelesen wie geschrieben (= phonetische Schrift).	(10) Betonung immer auf der vorletzten Silbe.	(11) Zusammengesetzte Wörter: einfache Verbindung mit Grundwort am Ende.	(12) Es gibt keine doppelte Verneinung.
(13) Zur Richtungsangabe wird die Endung ‚N' verwendet.	(14) Bedeutung von Präpositionen ist eindeutig. Ersatzpräposition ‚JE' bei übertragener Bedeutung.	(15) Fremdwörter werden orthographisch angepaßt übernommen.	(16) Endvokal von Substantiv und Artikel weglaßbar, Ersatz durch Apostroph.

Dorsflanke vi trovas kontaktadreson

1987: ILo ist Hauptarbeitssprache der Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino

*

INTERKIBERNETIK'88 fine de SUS 5

Interkibernetik'88 okazos en San Marino je la fino de SUS 5, nome de sabato, 3a de septembro, 15:30 h, ĝis lundo, 5a de septembro, 13 h. Informas Istituto di Cibernetica, Via dei Capuccini, RSM-47031 San Marino Citta.

*

Internacia konferenco pri morfosciencoj

La morfoscienca sekcio de AIS okazigos (kunlabore kun la Pola Esperanto Asocio, Vojevodia Filio en Krakovo) internacian konferencon pri morfosciencoj en Krynica, Pollando, 1988-05-02/08. Interesitoj turniĝu al Esperanto-Krakow, skrytka pocztowa 519, PL-30-960 Krakow 1.

La konferenco ne estas „SUS" en la senco de la regularo pri instruado kaj studado ĉe AIS. Tamen eblas akiri -per partopreno en la internacilingvaj kursoj de ADoc. Duc Goninaz dr. (F), de AProf. Hristo Marinov dr. (BG), de PDoc. Tyburcjusz Tyblewski dr. (PL) kaj de OProf. Josip Vranĉic dr. - studunuojn validajn por eventuala posta kandidatiĝo ĉe AIS.

*

Provizoraj gvidantoj de la Sekcio 5

Pro la morto de la dekano de la naturscienca sekcio ties vicdekano, OProf.Haszpra dr., rolas ĝis SUS 5 kiel deĵoranta dekano, sed li ne pretas kandidatiĝi por ĉi tiu rolo. Laŭ la peto de la prezidanto de AIS tial vicsenatano OProf. Kawamura dr. kandidatiĝos por la dekana rolo. Li ekde tuj jam helpas en la organizo de la programo de la natuscienca sekcio.

El la Programo por la 5-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 5)

okazonta 1988-08-27/09-05 en la Convento S.Maria dei Padri Servi di Maria, Borgo Maggiore Valdragone, Respubliko de San Marino *Stato: 1987-03-19/1687pfR*

1. Malfermo, fermo kaj oficialaj kunsidoj

Malfermo de SUS 5 (kun envestigoj kaj transdono de dokumentoj): dimanĉon, 08-28, 21-22 h, Teatro Titano, poste Interkona Vespero en La Grotta.

Fermo de SUS 5 (kun envestigoj kaj transdono de dokumentoj): dimanĉon, 09-04, 15-17 h, festsalono de la Convento S.Maria dei Padri Servi di Maria,

10-a Senatkunsido: dimanĉon, 08-28, 11-13 h kaj lundon, 09-05, 9-11 h, Convento.

5-a Asembleo de la Subtena Sektoro: dimanĉon, 08-28, 17-19 h, Convento S.Maria

7-a Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS: dimanĉon, 09-04, 17-19 h, Conv.

2. Sciencaj kursoj kaj prelegserioj (po 8 studhoroj plus libervola finekzameneto por enskribiĝintoj)

Sekcio 1: Kibernetiko (salono Schmidt - Adcock)

OProf.Dr.habil. Helmar FRANK, Paderborn (D): Elementoj de la prospektiva klerigscienco. 9-11 h (1KPa), lundon ĝis ĵaŭdo, ekzameneto: vendredon.

(Probable okazigos lingvokibernetikan kurson OProf.CHEN, Pekino, kaj klerigkibernetikan kurson OProf.MUŽIĆ, Zagreb.)

Sekcio 2: Humanistiko (salono Komensky - Szerdahelyi - Lapenna)

ADoc. Werner BORMANN dr., Hamburg (D) & AProf.Mario GREGO dott., Venezia (I): Ekonomiaj agadkampoj de metropoloj. 15-17 h (2KPc), lundon ĝis ĵaŭdo; ekzameneto: vendredon.

ASci.Mag.Heinrich J.DINGELDEIN, Marburg (D) & OProf.Georg MEIER dr., Olching/München (D): Eksterlingvaj lingvo-priskribproceduroj (Metodologio de la dialektologio, sociolingvistiko kaj pragmalingvistiko). 11-13 h (2KPb), lundon ĝis ĵaŭdo.

(Probable okazigos ADoc.Carlevaro dr., Bellinzona, kurson pri psikiatria kriminologio)

Sekcio 3: Struktursciencoj (salono Euklides)

OProf.Bozidar POPOVIC dr., Beograd (YU): Kalkulado de planedetaj orbitroj. 11-13 h (3KPb), lundon ĝis ĵaŭdo.

ASci.Gerard COOL, Leibnitz (A), OProf.Miloŝ LANSKY, Paderborn (D) & AProf.Karl SCHICK, Paderborn (D): Instruado de matematiko kiel fako kaj en aliaj fakoj.17-19 h (3KPd), lundon ĝis ĵaŭdo.

(Eventuale AProf.Schick dr., Paderborn, ripetos sian kurson „Struktogramoj")

Sekcio 4: Filozofio (salono Descartes)

ADoc. Helmut ANGSTL, München (D) & AProf. Werner STROMBACH, Dortmund (D):

Offizielle Bekanntmachung

Enkonduko en la logikon. 15-17 h (4KPc), lundon ĝis ĵaŭdo.
(Eventuale okazos dua prelegserio de ADoc.Pagliarani, Cessena, ASci. Ariella Colombin, Trieste, kaj AProf.Strombach, Dortmund, pri temoj el filozofiaj valorigteorioj.)

Sekcio 5: Natursciencoj (salono Galilei - Neergaard)

AProf.Hans-Dietrich QUEDNAU, München (D): Statistika metodaro. 9-11 (5KPa), lundon ĝis ĵaŭdo.
OProf.KAWAMURA Sin'itirô dr., Takamatu (J): Proteino kiel nutraĵo. 17-19 (5KPd), lundon ĝis ĵaŭdo.

Sekcio 6: Morfosciencoj (salono Gandhi)

ASci. Mag. Antje ESKE-ALSLEBEN & AProf. Kurd ALSLEBEN dr.h.c., Hamburg (D) La problemaro de bildigo en elektitaj ekzemploj. 11-13 (6KPb), lundon ĝis ĵaŭdo.

3. Docentiĝprelegoj, debutprelegoj, projektakceptigaj prelegoj kaj specialaj prelegoj de invititoj (kun sekvonta diskuto kaj paŭzo: po 60 minutoj)

4. Liberaj prelegoj (kun sekvonta diskuto kaj paŭzo: po 40 minutoj)

5. Lingvokursoj

NN: ILo por sciencistoj - rapidkurso por komencantoj kun antaŭkonoj), sabaton, 08-27, 15-17 h, 17-19 h, 21-23 h; 08-28 , 11-13 h, Convento dei Padri Servi di Maria.

6. Kromaj koncizprelegoj (po 20 minutoj inkluzive demandojn kaj paŭzeton)

Aliĝintaj SUSanoj rajtas - se sekcio ankoraŭ disponas pri tempo por tio - ankaŭ lastminute anonci prelegeton en ajna oficiala lingvo de AIS ĉe la koncernata (vic)dekano aŭ ties deĵoranta anstataŭanto (vd. afiŝon en la kongresejo), kunportante almenaŭ du afiŝeblajn foliojn DIN A 4 kun temo kaj sekcio; la tempo estos aldonata. La prelegdaŭro estu 10 - 15 minutojn, por ke restu iom da tempo por demadoj kaj por paŭzo ĝis la sekvonta programero. - La kunvenon gvidos (reprezentanto de) la dekano.

7. Kandidatprelegoj

Limdato por anonci kandidatiĝon sen pago de malfruiĝkotizo estas 1988-03-26. La kandidatprelegoj okazos plejgrandparte la 2an kaj 3an de septembro, publike.

8. Kadra programo

Kiel ĉiujare estos riĉa programo okaze de la festosemajno de la respubliko. Artan kadroprogramon realigos la sekcio 6. Okaze de SUS 5 estosla TAKIS-konferenco INTERKIBERNETIK'88 (1988-09-03/05), la Ĝenerala Asembleo de Eŭropa Klubo, renkontiĝo de la Akademio Comenius, kaj renkontiĝoj de aliaj organizoj.

Aliĝkotizo ĝis la 31-a de julio: 0,3 AKU (30,- DM, 21.900 LIT), poste 0,5 AKU. La aliĝintoj ricevos la detalan programon ekde monato aprilo.

Außerhalb der redaktionellen Verantwortung

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". – Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/ Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. – En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). – Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". – En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". – Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 – 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.